

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =  
frankoj 4,25 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =  
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

---

Uppsala.

Aprilo 1896.

N:o 4.

---

## De la redakcio.

En la lasta tempo multaj amikoj de nia lingvo sendis al la redakcio leterojn kun gratuloj, kun diversaj proponoj kaj konsiloj. La redakcio kore dankas ĉiujn korespondantojn kaj petas la legantojn de la "Lingvo Internacia" ankaŭ en estonta tempo skribi al ĝi pri ĉio, kio al ili plaĉas kaj ne plaĉas en la gazeto. Nur ĉe tia kondiĉo la gazeto povas esti viva ligilo inter la amikoj de Esperanto. Se la redakcio ne scios, kion la legantoj pensas pri ĝia agado, se inter la redakcio kaj legantoj ekzistas nenio komunikiĝo, nenio ligo, tiam la gazeto ne povos esti ligilo, ne povos plenumi la ĉefan rolon, kiu ĝi devas plenumadi. Tial ĉiu serioza letero pri la enhavo de la "Lingvo Internacia" estos ĉiam ne sole dezirata kaj ĝoje renkontata, sed ankaŭ utila gasto en la redakcio. Precipe gravaj kaj utilaj estus por ni la leteroj pri tio, kion niaj legantoj trovas nebona, neoportuna, nekonsvena en la gazeto. Sciante la voĉon de la legantaro, ni havos la eblon forigadi ĉiujn nekonsvenaĵojn kaj fari la gazeton ĉiam pli kaj pli interesa kaj utila por la amikoj de Esperanto, por kiuj ĝi estis kreita.

Havante nenian eblon skribi aparte al ĉiu korespondanto, ni penos nun respondi ĉiujn ĝis nun proponitajn konsilojn.

1) Multaj korespondantoj konsilas, ke ni eldonadu nian gazeton ne ĉiumonate, sed *ĉiusemajne*. Tion ĉi ni mem trege deziras, sed bedaŭrinde ĉe la nuna nombro da abonantoj kaj ĉe la nunaj kondiĉoj de presado la plioftigado de nia gazeto estas *absolute nebla*. Ni povas nur promesi, ke kiam ni havos pli ol 500 abonantojn, ni iom pligrandigos la amplekson de ĉiu numero, ne pligrandigante la abonpagon. Tamen ni ne perdas la esperon, ke en la estonta tempo al ni prosperos transformi la "Lingvon Internacian" en ĉiusemajnan ĵurnalon.

2) Kelkaj amikoj esprimas la deziron, ke ni presadu en ĉiu numero novaĵojn el vivo kaj literaturo, similajn al tiuj, kiuj estis presataj en la rubriko "El la mondo" de la "Esperantisto" Ŝajnas al ni, ke tiu ĉi rubriko estus en nia gazeto superflua kaj neinteresa, ĉar gazeto, eliranta *ĉiumonate*,


ne povas liveradi al la legantoj efektivajn *novaĵojn*. Niaj novaĵoj alvenadus al la legantoj tro malfrue kaj tial prezentus jam nenian intereson, estante pli frue tralegitaj en naciaj gazetoj.

3) Kelkaj korespondantoj petas, ke ni presadu en ĉiu numero problemojn de ŝako. Ni volonte ĝin farus, sed bedaŭrinde el la redaktoroj de nia gazeto neniu povas kondukadi tiun ĉi rubrikon, ĉar neniu el ni estas sperta ŝakisto. Eble in el niaj legantoj povus esti redaktoro de l' ŝaka rubriko?

4) Kelkaj korespondantoj konsilas, ke ni fondu apartan rubrikon, "Scienco kaj Arto" por la artikoloj kaj novaĵoj el tiuj ĉi regionoj. Pri tiu ĉi rubriko ni povas diri tion saman, kion ni diris pri la rubriko "El la mondo": nia malgranda kaj malofte aperanta folieto ne povas konkuri en tiu ĉi rilato kun diversaj naciaj gazetoj.

5) S-ro V. Ŝmurlo konsilas, ke ni fondu en la "Lingvo Internacia" unu novan konstantan rubrikon: "Vivo internacia". — "Mi varmege proponas — skribas s-ro Ŝmurlo — ke en Via gazeto estu presataj sciigoj pri ĉiuj estintaĵoj de la vivo internacia, kiel ekz. kongresoj, kunvenoj, ekspozicioj, konkursoj k. e., por ke la amikoj povu scii pri ili kaj alporti ĉe ĉiu okazo sian laŭfortan helpon" . . . Ni kun plezuro akceptas la proponon de s-ro Ŝmurlo, pensante, ke nenie la bezono je lingvo internacia estas tiom sentata, kiel en diversaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj; nenie sekve oni povas propagandian lingvon kun pli granda sukceso, ol en tiuj ĉi kongresoj. Sekve la presado de sciigoj pri tiuj ĉi kongresoj estos utila por nia afero. Ni petas niajn legantojn alsendadi al ni tiujn sciigojn, kiujn ili trovas en siaj naciaj gazetoj. Komencante de tiu ĉi numero, la rubriko "Vivo Internacia" estos konstanta en nia gazeto, se, kompreneble, ni havos por ĝi sufiĉe da materialo.

**La redakcio.**



## El Francujo.

Nia artikolo "Le cyclisme et l' Esperanto" jam montris ĝojigan efikecon inter la membroj de l' Union Vélocipédique de France. Ni ricevis multe da leteroj, ne sole de l' anoj sed ankaŭ de l' ĉefoj de la dirita societo. Ĉiuj konsentas, ke nia lingvo povus fari la plej grandan servon al la ciklistaro. Kelkaj el ili neordinare laŭdas "la geniecon" de doktoro Zamenhof. Tio ĉi konfirmas nian esperon, kaj ni estas tute konvinkitaj, ke la velocipedistoj, almenaŭ en Francujo, kreskigos multe la nombron de niaj amikoj, kiam ili posedos la vortareton specialan al ilia sporto. La aliĝo de tiuj vojistoj estas por ni dezirinda, ĉar per la radoj de ilia velocipedo ili povas transporti ĉien la konon kaj amon de nia lingvo. Cetere la plimulto da ili apartenas al tiu aĝo, en kiu la skeptikeco ankoraŭ ne naskiĝis kaj la fervoro ne malvarmiĝis. Ni do pli facile trovas adeptojn inter ili ol en la homoj difektitaj de l' antaŭjuĝoj, de l' dubemeco kaj ankaŭ tre ofte blindigataj de la scienca fiereco.


Estas alia kategorio da personoj, kiu pro siaj okupoj mem akceptos nin volonte, t. e. la kolektistoj kaj precipe la filatelistoj. Sed ili ankaŭ bezonas specialan vortareton. Ni do petis sinjoron R. Lemaire, kiu estas nun en militista servado, traduki la terminaron necesan al ilioj elŝanĝoj. Li tre kompleze jesis kaj baldaŭ donos al la filatelistoj, per vortareto franca-esperanta kaj returne, per diversaj modeloj de leteroj kaj anoncoj, ĉion kion ili bezonas.

Por la turista signo de l' Esperantistoj mi ricevis la sekvantajn mendojn aŭ promesojn:

S-ro Gernet 25 ekz, s-ro Costa 5, Abesgus 2, Laskin 3, Zinoviev 25, Maillard 3, Brich 2, Kazi-Girej 10, St. Dmochovski 2, de Majret 2, Kune 79.

Laŭ lasta informo, kiel mi diris, tiu ĉi projekto povos efektiviĝi, se 600 da mendantoj estos trovataj. Pri la sendo de l' mono mi sciigos en la gazeto.


Ni rekomendas al la imito de niaj amikoj la tre bonan ideon de s-ro Zinoviev, kiu intencas doni la signon al junaj adeptoj kiel rekompenco de iliaj sukcesoj en la ellerno de l' lingvo. *L. de Beaufront* (Epernay).



## El Heine.

Ho suno, kolombo, violo, lili',  
Mi amis vin multe, per granda pasi'.  
Sed nun mi adoras nur unu juvelon,  
La belan fajrhelan ĉielan anĝelon.  
Ŝi estas al mi nun pli kara ol vi,  
Ol suno, kolombo, violo, lili'.

**A. Kofman.**



## El Heine.


Sur tiu ĉi monto kunloĝas  
Tri ĉarmoj en bela kastel',  
Min feliĉigintaj per amo,  
Pli dolĉa ol pura miel'.

Sabate min kisis Mario,  
Dimanĉe — la bela Juli',  
Kaj lunde min preskaŭ sufokis  
Luizo en sia pasi'.

Sed marde ĉe ili estiĝis  
Festtago, kaj venis de l' val'  
Gastinoj en belaj kaleŝoj  
Kaj gastoj sur aro-ĉeval'.

Nur min vi ne vokis al festo.  
Ho, kia malsaĝo, pro Di'!  
L' onklinoj kaj babilulinoj  
Komprenis kaj mokis pri vi.

**A. Kofman.**



## Novaj<sup>ĉ</sup>oj.

### Novaj eldonoj en Esperanto.

— En la " *Scenska Turistföreningens årsbok*" (Jarlibro de l' Sveda Turista Societo) 1896 paĝoj 69—85 estas presata artikolo pri nia lingvo sub titolo "Esperanto sâsom Turistspråk" (Esperanto kiel turista lingvo). La artikolon skribis s-ro *V. Langlet*, kiu varme rekomendas nian lingvon al la svedaj turistoj. Per sia propra sperto kaj la sperto de s-ro Wasniewski li montras ke jam nun oni povas havi tre grandan praktikan utilon de posedi la lingvon Esperanto. Kompreneble la utilo estus ankoraŭ pli granda, se en ĉiu loko, kiu altiras turistojn, estus almenaŭ unu persono, posedanta la lingvon kaj deziranta helpi fremdajn turistojn. — Dank' al tiu artikolo jam ĉiutage al la klubo en Uppsala alvenas leteroj kun peto alsendi sciigojn pri Esperanto, lernolibrojn kaj vortarojn. — Ĉar la sveda "Ekzercaro" jam ne plu ekzistas, oni nun preparas novan

eldonon, kiu enhavos lernolibron kaj ekzercaĵojn. Per tiu laboro sin okupas s-ro *P. A. Nylén* en Uppsala.

— S-ro A. Kofman (Rusujo, Odeso, Neĵinskaja 34) pretigas nun kolekton da versaĵoj, tradukitaj el diversaj lingvoj. Li tre petas la eksterrusajn amikojn de nia lingvo sendadi al li la precizajn laŭvortajn tradukojn (en prozo) de plej eminentaj kaj karakteraj versaĵoj de ilia literaturo. Al la preciza traduko devas esti almetita ankaŭ la *akcentita* kopio de l' originalo. La akcentado estas necesa, por ke la versa traduko, kiu faros s-ro Kofman, estu eble pli proksima al la originalo ne sole laŭ la senco, sed ankaŭ laŭ la ritmo. Ĉar s-ro Kofman esperas havi la modelojn ne malpli ol el 20 diversaj lingvoj (angla, bulgara, dana, esta, franca, germana, greka, hebrea, hinda, hispana, ĥina, itala, japana, latina, malgrandrusa, pola, portugala, rumana, rusa, sveda kaj aliaj) kaj ĉar la libro ne povas esti tre granda, al ĉiu nacio estos dediĉitaj ne pli ol 5–10 paĝoj; kompreneble en la antaŭparolo estos montrita, kiu kaj en kia grado partoprenis en la laboro. Tiamaniere la verko estos kreita per komunaj penoj de multaj esperantistoj el diversaj nacioj kaj estos sekve internacia ne sole laŭ la enhavo kaj lingvo, sed ankaŭ laŭ la plenumado. Estas tre dezirinde, ke tiu ĉi verko estu preta en la fino de la sekvanta jaro 1897, kaj dediĉita al la aŭtoro de nia lingvo, kiel jubilea donaco.

— Eliris el presejo N:º 90 de nia literaturo. Tiu ĉi verko prezentas francan, rusan kaj polan tradukojn de la "Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto" (verko N:º 72). La franca traduko, farita de s-ro L. de Beaufront, estas provizita per multaj rimarkoj gramatikaj, kiuj donas la eblon al franca leganto evitadi pli facile la proprajojn de lingvo franca kaj pli precize kompreni la sencan de diversaj sufiksoj kaj prefiksoj. La verko estos tre utila al ĉiuj, kiuj ellernas nian lingvon sen ies helpo, kaj estas tre dezirinde, ke estu pli rapide eldonitaj la tradukoj de l' "Ekzercaro" en aliaj lingvoj.

— La societo "Espero" sciigas nin, ke s-ro *S. I. Tanejev*, bone konata en Rusujo komponisto kaj profesoro en la moskva muzika konservatorio, verkis muzikon por la "Preĝo" de Lermontov kaj "Sonoriloj de vespero" de T. Moore. La ambaŭ verkoj estos eldonitaj sub unu komuna titolo "Kantoj de esperantistoj."

S-ro Ŝmurlo tradukas nun el lingvo germana en Esperanton unu verkon teĥnikan pri vapormaŝinoj kaj vaporkaldronoj kaj invitas s-rojn teĥnikistojn partopreni en liaj laboroj por elektado kaj ellaborado de specialaj teĥnikaj esprimoj. La adreso de s-ro Ŝmurlo estas: *Rusujo, Ĉelabinsk* (gub. de Orenburg).

\* \* \*

### Grava propono.

De s-ro *M. S. Rakitski* (Suraj, gubernio de Vitebsk, selo Ostrovskije) ni ricevis la sekvantan leteron:

"Mi tralegis en N:º 1 de nia gazeto la proponon de s-ro Avilov, ke ĉiuj esperantistoj enkasu po 1 % el sia jara enspezo por disvastigo de nia afero. Mi tre aprobas tiun ĉi proponon kaj, laŭ ekzemplo de s-ro Avilov, promesas enkasi 1 % el mia jara enspezo por la dirita celo. Mi sendos tiun ĉi enkason al s-ro Gernet ne pli malfrue ol la 15-an de decembro de tiu ĉi jaro, unutempe kun la abonpago de la gazeto por la estonta jaro 1897, por eviti la superfluan elspezon de transsendo. Mi invitas ĉiujn esperantistojn fari tion saman. Mi konsilas sendi la promeson de la nomita enkaso al s-ro Gernet; mi konsilas presi en nia gazeto la nomojn de la promesantoj, kaj post la ricevo de l' mono presi la nomojn de la alsendantoj. Mi pensas, ke se ĉiuj



esperantistoj aŭ signifa parto da ili donos eĉ po 1 % el sia jara enspezo, tiam kolektiĝos sufiĉe granda sumo da mono, kiu donos la eblon pligrandigi nian literaturon kaj gazeton, propagandi nian lingvon, kaj entute — starigi nian aferon sur pli fortikan fundamenton. — M. S. Rakitski.”

Al ni ŝajnas, ke la proponata de s-roj Avilov kaj Rakitski konstanta kaj regula oferado efektive povas alporti multon da utilo al nia afero. Sed estas necese, ke ĉiu oferanto montru precize, *por kia celo li ofertas la monon*: por pligrandigi la literaturon, aŭ por la propagando de l' lingvo, aŭ al la gazeto. En nia gazeto ni volonte presos la nomojn de la oferantoj kaj la detalajn kalkulojn post la uzo de l' mono kolektita. Ju pli precizaj estos la montroj de s-roj oferantoj, des pli facila estos la uzado de l' mono.

### Mona kalkulo pri la esperantistaj fotografajoj.

En la N:o 3 de nia gazeto ni presis jam sciigon pri la grupo, dediĉita al s-ro Trompeter. Nun ni donas la monan kalkulon, alsenditan al ni de s-ro Gernet el Odeso:

Monajn oferojn alsendis la sekvantaj personoj: s-ro *A. Zinocjev* 3,00 rublojn; s-ro *A. Pesocki* 0,35 r.; s-ro *Ŝolomij* 0,50 r.; s-ro *Gustafsson* 0,40 r.; s-ro *Vladikin* 1,00 r.; s-rino *Sereda* 3,00 r.; s-ro *Kazi Ĝirej* 3,00 r.; s-ro *Petrjajevski* 0,42 r.; s-ro *Ŝĉavinski* 1,00 r.; s-ro *Thörn* 0,50 r.; s-ro *Hübert* 1,00 r.; s-ro *Semenov* 0,21 r.; s-ro *Kadik* 1,00 r.; s-ro *Raekson* 0,50 r.; s-ro *Zamenhof* 10,00 r.; s-ro *de Beaufront* 4,00 r.; s-rino *Mankovskaja* 3,00 r.; s-ro *Sutkovoĵ* 1,00 r.; s-ro *Grünfeld* 0,42 r.; s-rino *Prohoroviĉ* 1,00 r.; s-ro *Kanaloŝĵj-Lefler* 5,00 r.; s-ro *Portnov* 1,00 r.; s-ro *Koraĉev* 0,80 r.; s-ro *Naumov* 1,00 r.; s-ro *Guminski* 21,00 r. (de li mein, de s-rino *Vogau*, s-ro *Haller* kaj s-ro *Sokolov*); s-ro *Jonson* 4,25 r.; s-rino *Boroĉko* 1,00 r.; s-ro *Gernet* 3,00 r.; kune **72,41 rublojn.**

Elspezoj estis la sekvantaj:

Pretigo de la unua ekzemplero de l' grupo . . . . .	42,00 rubl.
Pretigo de tri ekzempleroj de la grupo por la personoj, kiuj, alsendante la monon, sciigis, ke ili alsendas ĝin por la grupo	12,00 ..
La kadro por la ekzemplero de s-ro Trompeter . . . . .	6,50 ..
Lignaj kestoj por 4 ekz. de la grupo . . . . .	2,00 ..
Elspezoj por transsendo . . . . .	10,16 ..
	<hr/>
	Kune <b>72,66</b> rubl.

\* \* \*

S-ro Trompeter, ne havante la eblon danki aparte ĉiun personon, kiu alsendis al li la fotografajon, petas nin prese esprimi lian koran dankon al ĉiuj alsendintaj al li la portretojn.

\* \* \*

En la N:o 3 de la gazeto “Linguist”, inter la respondoj de la redakcio ni trovis la sekvantajn liniojn:

“*Red. de l. i.* La almenaŭ — tre malprecizaj sciigoj pri nia gazeto, kiuj devas trompi la legantojn pri la programo de “L.” (kaj esprimoj, kiel “vendi rajtojn” . . .) ne pruvas *sincerecon e la seriozan deziron* por unigo!”

Sendube tiuj ĉi malfavoraj vortoj koncernas la artikolon “Nova gazeto internacia”, presitan en nia januara numero. Ni tre petas la estimatan re-

dakcion de "Linguist" klarigi al ni pli precize, kiaj sciigoj presitaj en nia gazeto pri la programo de "Linguist" estas "tre malprecizaj" kaj "devas trompi la legantojn", ĉar la "almenaŭ tre malprecizaj kaj senfundamentaj kulpigoj povas pravi ion eĉ pli malbonan, ol la mankon da sincereco.

\* \* \*

**Pri la lingvo Esperanto parolis** en la lasta tempo la sekvantaj gazetoj kaj ĵurnaloj: en la N:o 4 de la "*Bulletin officiel de l' Union Vélocipédique de France*" estas presita tre bona kaj konvinka artikolo sub la titolo "Le cyclisme et l' Esperanto", subskribita de s-roj L. de Beaufront kaj Pierre Deullin. En la artikolo nia lingvo estas varmege rekomendata al la velocipedistoj. La folieto de s-ro de Beaufront, presata en tiu ĉi numero de nia gazeto certigas, ke tiu ĉi artikolo jam havis bonajn rezultatojn. En la N:o 4 de "*L' Etranger*" estas presita daŭrigo de l' interesaj "Varsoviaj Skizoj" de s-ro Wasniewski kun franca traduko de s-ro Beaufront kaj kun tre utilaj gramatikaj rimarkoj. En la sama numero de "*L' Etranger*" sin trovas ankaŭ la notoj de s-ro Beaufront pri la ekstera signo de esperantistoj, pri la reviviĝo de la "Biblioteko" kaj ankaŭ granda anonco pri nia lingvo kiel mirinda ilo por interkomunikigo. S-ro Wasniewski sciigas nin, ke la pola ĵurnalo "*Kraj*" (Lando), eldonata en Peterburgo, donis en N:o 70 al ia sinjoro la sekvantan respondon de la redakcio:

"Por la aŭtoro de la artikolo "Eterna paco" la tutmonda lingvo estas nepra konsekvenco de historio kaj civilizacio, almenaŭ malproksima kaj dubebla verebleco. En ĉia okazo la tutmonda lingvo — laŭ la aŭtoro de la artikolo — povas esti sekvo, sed ne kaŭzo de reguligo de internaciaj rilatoj".

S-ro Wasniewski juste aldonas, ke la peterburga organo iom eraras, ĉar la plej bona rimedo por pliproksimiĝo, interkompreniĝo kaj ekkoniĝo estas nur lingvo internacia. Alie la diversaj nacioj ĉiam batalos inter si — laŭ la vortoj de l' ĉefa redaktoro de "*La Liberté Economique*", s-ro F. Robin — pro malvasta patriotismo de popoloj. Sajne la multaj atestoj kaj pruvoj de niaj amikoj estas la plej konvinka vorto, ke la lingvo internacia sole povas esti kaŭzo de eterna tutmonda paco. S-ro Seleznet skribas, ke en la januara numero de "*Novaje Slovo*" (Nova Vorto) sin trovas kelkaj vortoj pri nia afero.

S-ro Siösteen alsendis al ni N:o 64 (17:a de marto) de *Kristianstadsbladet* (sveda gazeto), kiu enhavas sufiĉe longan artikolon pri nia lingvo. Tiu artikolo, kiu havas la titolon "Världsspråk" (lingvo tutmonda) parolas pri la projektoj de tiaj lingvoj antaŭ Esperanto kaj poste pri tiu ĉi lingvo, kiun l' aŭtoro nomas la plej bonsona kaj facillernebla el ĉiuj tielaj projektoj kaj plej varme rekomendas al la legantoj. En la fino de l' artikolo nia gazeto estas nomata kaj ankaŭ kelkaj praktikaj spertoj de esperanto. Komprenoble tielaj artikoloj estas por nia lingvo de plej grava utilo.



## Malpli kaj multpli.

La blank-maneto	Ŝia talio.
De Henrieto	Die gracia.
Estas malgranda, ho mia Di'!	Estas mallarĝa, ho mia Di'!
Sed ŝia koro —	Sed la prudento —
Kia doloro! —	Kia turmento!
Estas malpli.	Estas malpli.
Ŝiaj ligharoj	Ŝiaj okuloj
Neordinaraj	La fajrobrulaj
Estas longegaj, ho mia Di'!	Estas plennigraj, ho mia Di'!
Sed ŝia lango —	Sed la animo —
Fakto tre stranga! —	Ha, kia rimo! —
Estas multpli.	Estas multpli.



Amiko.

## Vivo Internacia.

### La dekdua kongreso internacia de kuracistoj.

Tiu ĉi kongreso estos en Moskvo en aŭgusto de la jaro 1897, sub la favoro de l' granda princo Sergij Aleksandroviĉ. La laboroj de la kongreso estas dismetitaj en la sekvantaj 12 apartaĵoj: 1) anatomio; 2) fiziologio; 3) komuna patologio kaj anatomio patologia; 4) komuna terapio; 5) malsanoj internaj; 6) malsanoj infanaj; 7) malsanoj de nervoj kaj de prudento; 8) malsanoj de haŭto; 9) ĥirurgio kaj malsanoj de okuloj; 10) arto de akuŝistoj kaj malsanoj virinaj; 11) higieno; 12) medicino juĝa. La kongreso estos sub la ordo de l' medicina fakultato de la Imperiestra Universitato en Moskvo. La aranĝado de la kongreso estas komisiita al la komitato, kies prezidanto estas la kuratoro de l' moskva instrua distrikto, kaj kiu konsistos el ĉiuj membroj de l' medicina fakultato kaj ankaŭ el diversaj honoraj personoj, kiuj povas helpi al la kongreso. La kongreso daŭros de l' 19-a ĝis la la 26-a de aŭgusto. La membra pago estos 25 frankoj.

Por ni specialan intereson havas la demando pri la lingvo en tiu ĉi kongreso. En la N<sup>o</sup> 6 de l' rusa ĉiusemajna gazeto "Vraĉ" (Kuracisto) estas presita unu letero de l' sekretario de l' estonta kongreso, s-ro P. J. Djakonov. Ni prenas el tiu ĉi letero la sekvantajn liniojn:

*"La neoportunaĵoj de la diverslingveco en la antaŭaj internaciaj kongresoj de kuracistoj fariĝis ĝis tia grado okulvideblaj, ke post la kongreso en Romo la medicina preso de ĉiuj landoj ne unufoje montris jam, ke estas necese, ke ĉiuj raporto kaj disputoj en la kongresoj internaciaj estu en unu lingvo,* konfesata la oficiala lingvo de l' kongreso, kaj la lingvo franca estis de ĉiuj unuanime nomata la plej konvena. La medicina fakultato de l' Universitato en Moskvo, ellaborinta kaj konfirminta la regularon de la kongreso, ne povis ne turni la atenton al tiu ĉi persista postulo de l' preso medicina kaj tial konfesis oficialan lingvon de l' kongreso la lingvon francan, la lingvon de diplomatiistoj, la lingvon, kiu jam longe servas por la internaciaj interkomunikigoj de la registaroj de ĉiuj landoj en Eŭropo. *Sed montriĝis ke por tiu ĉi fojo estas neeble sekvi al tiu ĉi principo en tuta ĝia pureco; oni estis devigita permesi ankaŭ, almenaŭ principe, la lingvon rusan. Sed kompreneble la medicina fakultato kaj la Aganta Komitato de l' Kongreso ĉe tio ĉi konsciis, ke pro la delikateco rilate la eksterrusajn gastojn la rusaj kuracistoj devas laŭ eblo evitadi la uzadon de sia parenca lingvo, kiu estas konata nur de tre malmultaj alilandanoj. Ĉe tiuj ĉi kondiĉoj aperis nova embaraso. Tre multaj el la rusaj kuracistoj, kiuj estis instruataj en la germanaj universitatoj kaj per germanaj lernolibroj, pli bone scias la lingvon germanan, ol la francan, kaj tial la permeso de sola franca lingvo por la raporto kaj disputoj estus por niaj rusaj kolegoj, evitantaj la lingvon francan pro la supredirita fundamento, tro ĝenanta. Tiamaniere la medicina fakultato ne pensis, ke ĝi havas la rajton forprenadi de la membroj de l' Kongreso la eblon paroli, laŭ la deziro, en lingvo franca aŭ germana. Sed permesante pro tiuj ĉi konsideroj du lingvojn nerusajn por la raporto kaj disputoj en la Kongreso, ni ne kaŝas antaŭ ni, ke ni flankiĝis, — pro neceso, vere — de la principo de unulingveco, kaj ni konscias, ke en estonta tempo oni devas celadi al la efektivigo de tiu ĉi principo en ĝia tuta pureco"* . . .

El tiu ĉi letero sekvas: ke

a) la neoportunaĵoj de la diverslingveco *estas oficiale konsciitaj* de la komitato de l' Kongreso.

b) kiam oni deziras elekti ian *lingvon nacian* por eviti la diverslingvecon, *oni necese cenus rec al la diverslingveco*, ĉar ne ekzistas lingvo nacia-internacia.

Videble la Komitato de la Kongreso staras jam sufiĉe proksime al la vera solvo de tiu ĉi problemo. Se la diverslingveco estas malbono, se oni ne povas forigi tiun ĉi malbonon, elektinte ian lingvon nacian, oni devas elekti por la internacia kongreso ankaŭ la lingvon internacian. Sed ial la Komitato ne faras tiun ĉi konkludon kaj proponas anstataŭ ĝi *celadon* al la forigo de l' diverslingveco en ia alia maniero. Eble oni deziras proponi al la kuracistoj de la tuta mondo ellerni la lingvon francan? La sekvantaj linioj, kiujn ni prenas el "*The New-York Medical Record*" (numero de II, 1) povus klarigi la veran koston de tiu ĉi propono, se ĝi estus farita:

"La komitato de la estonta kongreso en Moskvo decidis la demandon pri lingvo internacia, konfesinte la lingvon francan kiel oficiala. Ni nenion havus kontraŭ la akcepto de unu lingvo en ĉiuj kunvenoj kaj ne disputus kontraŭ la rajto de la Komitato decidi la demandon tiom komplikitan, kvankam ni dubus pri la taŭgeco de simila decido. Sed kiam la administrantoj de la Kongreso, kiu devas esti internacia, elstrekas la lingvon anglan, — la plej gravan en la mondo, — kaj arbitre anstataŭigas ĝin per la plej malfacila kaj malplej grava el la ĉefaj ses lingvoj de Eŭropo, ili donas al la Kongreso lokan karakteron *kaj igas la eksterrusanojn kompreni, ke oni ilin tute ne bezonas.*"

Tiamaniere, elektinte lingvon nacian anstataŭ la internacia, la Komitato de la estonta kongreso ne sole ne forigis la diverslingvecon, sed eĉ vekigis malpacon inter la reprezentantoj de diversaj nacioj.

S-ro *Kazi-Girej* (Rusujo, Borisoglebsk, Sud-Orientaj Fervojoj) skribas al ni pri la sama kongreso la sekvantan:

"Sendube, laŭ la ekzemplo de pasintaj similaj kongresoj, la plimulto de kongresanoj komprenos nur  $\frac{1}{3}$  aŭ eĉ pli malmulte el ĉio, kio estos tie parolata. Jen kiam ni, esperantistoj, devas pretigi por la kongreso konvene kaj serioze verkitajn propagandajn broŝurojn *en diversaj lingvoj* por ĉiuj diversnacionoj de la kongreso, kun 1) invito turni la atenton al nia lingvo, 2) kun mallongaj sciigoj pli la lingvo kaj 3) kun kelkaj belaj modeloj de nia prozo kaj poezio nepre kun traduko en lingvon nacian. Kompreneble, la sukceso povas dependi preskaŭ sole de la prospera verkado de la invit-anonco; por verki ĝin pli boni ni povus anonci konkurson inter la esperantistoj . . . Tiujn ĉi broŝurojn oni devas kompreneble disdonadi al la kongresanoj senpage. La monon por tiu ĉi afero oni povus ricevi per nia komuna oferado, kies komencon mi estas tute preta fari" . . .

Ni plene aprobas la proponon de s-ro *Kazi-Girej* kaj proponas al la amikoj de nia afero partopreni en la oferado kaj verkado de la propaganda broŝureto. Al la esperantistoj-kuracistoj ni proponas ankaŭ kolektadi materialojn por la speciala medicina vortaro kaj sendi ilin al ni. Eble iu el la esperantistoj intencas viziti persone la estontan kongreson kaj konsentos havi tie paroladon pri nia lingvo?



En la jaro 1897 estos *ekspozicio internacia en Bruxelles*. Kun ĉiaj demandoj oni petas sin turni laŭ la adreso: *Commissariat Général de l'Exposition Internationale de 1897 à Bruxelles. Bruxelles, Belgique.*

\* \* \*

De majo ĝis oktobro en la nuna jaro 1896 estos en *Innsbruck*, Tirolujo, *ekspozicio internacia por higieno, edukado de korpo kaj sporto*. La detalajn sciigojn kaj informojn oni povas ricevi de *Direction der Internationalen Ausstellung für Körperliche Erziehung, Gesundheitspflege und Sport. Innsbruck Tirol.*

\* \* \*


De s-ro Otto Zeidlitz, la konata tradukinto de "La literaturisto kaj lia fianĉino" kaj multaj belaj versaĵoj, ni ricevis la sekvantan skribaĵon:

"Mi prenas al mi la liberecon turni la atenton de la esperantistoj al tio, ke sonere en la jaro 1897 estos en Stockholmo granda ekspozicio kaj ke estus grave, se nia afero tiam estus en ia maniero prezentita. Svedajn kaj alilandajn esperantistojn, kiuj sin interesas je tiu afero, mi ĝentile petas havi bonecon alsendadi al mi siajn proponojn pri tio, *antaŭ la fino de julio*. Kiam alvenos al mi ĉiuj proponoj, mi penos ilin kunigi en unu tutajon kaj skribos en "L. I." proponon pri la aranĝado de l' afero. Amikoj esperantistoj! Ni ne povas lasi forkuri el niaj manoj nun tiel favorantan okazon konatigi kun nia afero grandan nombron da homoj. — Volu plej eble baldaŭ sendi Vian proponon al

*Otto W. Zeidlitz, Korpilombolo, Svedujo.*

\* \* \*

S-ro V. Ŝmurlo (Rusujo, Ĉelabinsk) proponas sendi al ĉiu ekspozicio aŭ kongreso internacia po 2—3 centoj da nove eldonita propaganda broŝureto pri korespondado internacia por senpaga disdono al la vizitantoj la ekspozicion aŭ kongreson. Por tiu ĉi celo s-ro Ŝmurlo sendis al ni 10 rublojn. La proponita de s-ro Ŝmurlo dissendo da propagandaj broŝuretoj estas laŭ nia opinio tre utila kaj ni invitas la amikojn de lingvo internacia imiti la ekzemplon de s-ro Ŝmurlo. Ĉar ni presados en nia gazeto la sciigojn pri diversaj internaciaj kongresoj kaj ekspozicioj, ĉiu alsendante la monon povos montri al ni precize, al kia kongreso aŭ ekspozicioj devas esti senditaj la broŝuretoj, aĉetitaj por lia mono. En la gazeto ni regule presados la nomojn de s-roj oferantoj kaj la raportojn pri la uzo de mono alsendita.




### Kanteto de fraŭlino.

(Popole.)

Printempo ree floras  
Kaj mi denove ploras:  
Edziĝas fraŭloj kun fraŭlinoj  
Kaj min nur malmemoras.

Printempo ree venas,  
Mi plu min ne éagrenas:  
Edziĝas fraŭloj kun fraŭlinoj,  
Min ankaŭ fraŭlo prenas.

Amiko.





## Novaj ideoj kaj malnovaj faktoj.

En N-ro 3 de la gazeto "Linguist" aperis artikolo de s-ro A. Grabowski: "Reforma projekto". Tiu ĉi artikolo parolas pri nova formo de lingvo internacia, apartenanta al l' aŭtoro mem. Kiu scias eĉ malmulte la historion de lingvo internacia, tiu scias, ke la nombro da similaj proponitaj formoj estas tiom granda, ke estus tute senutila afero kritiki tiun aŭ alian\*). Ni jam bone scias, ke proponi skizon de ia formo kaj krei efektivan sistemon de arta lingvo estas du aferoj tute malsamaj. Kaj se ni metas atenton al la artikolo de s-ro Grabowski, ni tion ĉi faras nur tial, ke en la fino de ĝi la aŭtoro esprimas deziron sekvigi "nova idej entre i Esperantisti". Mi ne scias, ĉu ĝi sekvigos novajn ideojn, sed malnovajn pensojn ĝi efektive sekvigas.

En la jaro 1894, dank'al influo de kelkaj personoj, en kies nombro estis s-ro Grabowski, la "Esperantisto" komencis preparoladi la demandon pri reformoj en Esperanto. Forigante tute la filologian flankon de la demando kaj memorante nur la rusan proverbon: "ĉe sep vartistinoj infano estos sen okuloj", kvin personoj el la odesa esperantistaro protestis per aparta cirkulero kontraŭ ĉiuj interparoloj pri reformoj. Tiuj ĉi interparoloj estis neĝustatem-paj kaj dank' al tio — malutilaj. Per respondoj de la esperantistoj al la aŭtoroj de l' cirkulero estis kolektita riĉa materialo, konservata inter la pape-roj de la odeso esperantistaro. Estus dezirinde, ke la redakcio de "Lingvo Internacia" konatigu la esperantistojn mallonge kun tiu ĉi materialo. Tiel, ekzemple, inter la kolektitaj leteroj sin trovas ankaŭ letero de s-ro Beaufront, konstatanta la fakton, ke la parolado pri reformoj tute paralizis je ia tempo la propagandadon de Esperanto en Francujo. En novembro estis publikitaj la rezultatoj de l' voĉdonado. 11 personoj voĉis por la proponitaj reformoj, 3 personoj ekdeziris tute aliajn reformojn, kaj 93 personoj donis voĉojn por reformoj de l' reformoj: 157 personoj, laŭ diversaj kaŭzoj, voĉis kontraŭ re-formoj — kaj s-ro A. Grabowski estis inter tiuj ĉi 157 personoj.

Tiu ĉi fakto estas tre instruanta. S-ro Grabowski ne aliĝis al s-roj Leontjev, de Wahl kaj Evstifejev\*\*), kiuj diris, ke ili estas por reformoj, sed tute aliaj, ol la proponitaj; li ne aliĝis al alia grupo, kiu deziris aliigon de l' ellaboritaj ŝanĝoj; li simple voĉis kontraŭ ĉiu reformo (ĉar precize tia estis la senco de unua punkto de l' voĉdonado). Estis videble, almenaŭ por la personoj, kiuj sciis pri la reforma agado de s-ro Grabowski, ke li iom ŝanĝis sian opinion; oni povis supozi, ke li ekvidis, ke tio, kio estas tre oportuna teorie, povas sin montri tre neoportuna praktike. Sed tiu ĉi konkludo estis tute malvera. S-ro Grabowski, kiu agadis por reformoj kaj donis voĉon kontraŭ reformoj, ree esprimas prese deziron, ke la esperantistoj sin okupu per tiu ĉi utila afero. Sed tie ĉi aperas antaŭ ĉio tre interesa demando: kio garantias, ke s-ro Grabowski, rekomendanta ree la reforman demandon, ne voĉdonos ree kontraŭ reformoj?


Tio ĉi estas neebla en unu sola okazo: se la esperantistoj akceptos nome tiujn reformojn, kiujn donos al ili s-ro Grabowski. Sed se la reformoj estos

\*) Rilate tion ni ne tute konsentas kun la estimata aŭtoro. La kritikado ne estas afero senutila. Bedaŭrinde en la lasta tempo oni pli multe proponas, ol kritikas.

Red.

\*\*\*) NN 8 kaj 11 de "Esperantisto", 1894.

prilaborataj de multaj personoj — kio povas esti tre ebla, kiel jam montris la faktoj — s-ro Grabowski povas ree ne ekdeziri reformojn. Sed oni ne devas tiel ludi kun la sorto de tia serioza kaj tia rompebla afero, kiel la afero de lingvo internacia. Oni trovas tre malmulte de amantuloj ellernadi lingvon, posedantan emojn de mita Proteo. Tial antaŭ ol peni elvoki la malnovajn fantomojn de reformado, s-ro Grabowski devus montri al la esperantistoj, ke la historio de la jaro 1894 ne estos ripetata. — kaj por tia konvinko li povas havi neniajn fundamentojn; tial la deziro elvoki “nova idej entre i Esperantisti” estas iom antaŭtempa. **B.**



## Kelkaj vortoj pri unu projekto plibonigi la lingvon Esperanto.

Sinjoro A. de Grabowski, jam de longtempe malkontenta je Esperanto, nun “deziras forigi la malbonaĵojn” de tiu ĉi lingvo kaj proponas siajn plibonigojn en formo de malgranda projekto, presita en la gazeto “Linguist” n:o 3. Li trovas ke “kompare je Volapük la lingvo Esperanto prezentas grandan intereson, estante pli natura kaj harmonia, kaj dank’ al sia preciza difino de radikoj kaj gramatikaj elementoj ĝi estos ĉiam modelo por imito”. Tamen li “bedaŭras, ke la leksikono Esperanta estas kunmetita el miksaĵo da diversaj tute malsamaj idiomoj kaj da diversaj “prononsacioni” (elparoloj? akcentoj?). Ĝia gramatiko estas produkto ne de novtempa komparanta romana lingvoscienco, sed produkto de fantazio, kaj ĝiaj malnaturaj prefiksoj (aldonataj antaŭsilaboj) kaj sufiksoj (postsilaboj) formas multe da barbarismoj anstataŭ vortoj internaciaj; ekzemple: “komunikiĝo, legigi” anstataŭ “comunicaciono, legalizer”. Laŭ siaj fortoj, s-ro Grabowski “deziras forigi tiujn ĉi malbonaĵojn kaj alporti siajn penojn por posta komuna konstruo.”

La problemo, kiun s-ro Grabowski volas solvi, estas klara. Unue, ĉar Esperanto estas kunmetitaĵo el *diversaj* idiomoj, al li restas fari aŭ montri, ke oni povas fari alian artan lingvon, kies sola ĉerpejo estas unu lingvo. Tion ĉi li konstatas dirante, “ke ĉiuj tiel nomataj internaciaj vortoj, komunaj al tiom da nacioj, trovas sin en la plej polurita lingvo romana, en la lingvo franca”. Li motivas tion ĉi per la rimarko ke la perfektita lingvo franca estos “komprenebla por ĉiuj personoj, sciantaj la lingvon francan, proksimume por 100 milionoj da homoj.” Due, ĉar la elparoloj (akcentoj?) estas diversaj (ne respondas al akcentoj de la lingvo-fonto?) li sendube volas uzi ne diversajn akcentojn, sekve nur tiajn, kiujn permesas la lingvo-ĉerpejo. Trie, ĉar la antaŭsilaboj kaj finiĝoj estas malnaturaj li kompreneble volas krei prefiksojn kaj sufiksojn pli naturajn. Tio ĉi estas ĉio, kion deziras s-ro Grabowski, ĉar nenion alian oni povas legi en lia artikolo de la suprenomita gazeto.

La artikolo de s-ro Grabowski estas skribita en lingvo, kiun mi ne konas; sed ĝi estas entute komprenebla. Tio ĉi estas sendube la modelo de lia proponata lingvo. Mi efektive trovas tie preskaŭ nur francajn vortojn, tie kaj tie ĉi iom aliigitaj en itala maniero. Tiaj ekzemple estas la vortoj: “comparazono (legu: comparazono = komparo), lingŭo, harmonioza, melanjo (legu: melanĵo = miksitajo); cŭo = ke, cŭela (tiu ĉi?), cŭal (= kiel?), noŭ, voŭ, loŭ (= ni, vi, ili).

Ĉar la projektata lingvo estas laŭ deziro de s-ro Grabowski kunmetota

el vortoj francaj, ĝin certe scios nur personoj, kiuj scias lingvon francan. Sed homoj, sciantaj sian propran lingvon kaj la francan, havas per tiuj ĉi du kompreniloj sufiĉe da rimedoj por komunikiĝi kun la mondo alilanda: por ili lingvo arta ne havas grandan signifon, almenaŭ ĝi havas pli malgrandan signifon ol por homoj, kiuj scias nenian fremdan lingvon kaj bezonas havi ĝin. Tamen oni povas paroli alie; oni povas diri, ke la projektata lingvo havos nur francajn vortojn, sed ĉiuj esceptoj, malregulecoj kaj idiotismoj (speciale naciaj esprimoj) estos forigitaj, kaj tiamaniere purigita lingvo estos tuj ellernebla. Vere, mi estas konvinkita, ke se la ellerno de la viva franca lingvo postulas dek jarojn aŭ eĉ pli, la ellerno de simpligita lingvo ne daŭros pli ol tri-kvar monatojn, ĉar la plej granda malfacileco estas ne vortoj, sed esceptoj k. t. p. Tamen pro kio fari la leksikonon internacian nepre el vortoj francaj? Se mi ne scias la francan vorton "plume" por mi estas tute egale ellerni tiun ĉi vorton aŭ ĝian rusan signifon "peró", la germanan "Féder" k. t. p. Pro tiu ĉi kaŭzo mi ne vidas, pro kio la leksikono franca estus preferinda je leksikono de alia lingvo aŭ je leksikono-miksitaĵo, kiu malplaĉas al ne-franco s-ro Grabowski kaj plaĉas ekzemple al franco s-ro Beaufront. Kontraŭe, mi decide preferas la anglan vorton "jes" anstataŭ la franca "oui", la anglan vorton "impress" anstataŭ la franca "empreinte", sed la franca vorto "exiler" estas pli bona ol la angla "banist." Figaro tute ne sciis la anglan lingvon ekster la vorto "goddam", kaj diris, ke li povis travojaĝi tutan Anglujon kaj esti komprenata: certe, Figaro estis granda ŝerculo, sed lia rimarko tre bone montras, ke ĉia lingvo havas iom da vortoj, kiuj estas konataj al ĉiu, kaj sekve ĉiu estas iom "poliglota" (multlingvoscianta) malgraŭ la neigo de s-ro Grabowski. Pro kio ne preni tiajn vortojn en internacian leksikonon, eĉ se ili prezentas "malsamajn idiomojn?" Se ili respondas nian celon kaj estas sencoditajn, ni propriigu ilin, ĉar ili jam estas fakte propriigitaj. La angloj, germanoj kaj rusoj propriigis la vorton "porter" sed ne la francan "double bière", la latina "procento" estas pli bona ol "interêt, pour cent, per cent", "sabato" — pli komprenebla ol "samedi" k. t. p.

Mi diris, ke mi ne scias, kial s-ro Grabowski elektas la francan lingvon por fari ĝin patro de lia projektata lingvo. Li tamen diras ion, kio povus esti prenita por motivo, nome "ĉiuj tiel nomataj internaciaj vortoj, komunaj al tiom da nacioj, trovas sin en la plej polurita lingvo romana, en la lingvo franca." Certe, neniu dubas ke ĝi enhavas grandan nombron da fremdvortoj. Por ne paroli pri la historio de tiu ĉi lingvo, oni povas tuj rimarki ke ĝi enhavas amason da ne-romanaj pruntitaĵoj: *grekaj*: biographie, mètre, chef (kephalê), baleine (phalaina), balle (ballô), barbare, bibliothèque (biblon + thêkê), mélodie, bolide (bolis), *anglaj*: spencer, yacht, steam-boat, speech, whiskey, bank-note, bol = bowl, water-closet, wagon, keepsake, specimen, warrant k. t. p., *germanaj*: bande, bivnac (bei + Wacht), kirst-wasser, bloc (block), blockhause k. t. p., *rusaj*: steppe, knut, kremlin, tzar, *keltaj*: baraguin (bara + gwin), bassin (bac), batre, *arabaj*: chiffre, *turkaj*: kiosque (kieuehk), *hinaj*: kaolin, *hebrea*: sabate, k. t. p. k. t. p. Ĉu tiun ĉi motivon (alian mi ne trovas) volas doni s-ro Grabowski? Ĉu la motivo estas tio, ke la franca lingvo enhavas grandan nombron da "tiel nomataj internaciaj vortoj"? Sed se la pli preferinda kaj elektinda lingvo estas tiu, kiu enhavas pli da fremdaj vortoj, tiam la plej preferinda estas Esperanto, la "malnatura miksitajo". Mi ne permesas al mi pensi, ke s-ro Grabowski tiel eraras. Ĉu li povas kredi, ke la lingvo franca, lingvo nacia, faras bone, uzante fremdajn vortojn,

kaj tion saman ne devas fari lingvo internacia, kiu estas devigita preni nur tiajn fremdovortojn, kiuj troviĝas en la lingvo nacia, "enhavanta ĉiujn tiel nomatajn fremdajn vortojn"?

Videble tie ĉi kaŝas sin iaj nekomprenejaĵoj kaj mi tre dezirus, ke s-ro Grabowski faru iajn klarigojn. Nun mi povas nur diri, ke la plimulto de la vortaro estas kunmetita el vortoj romanaj kaj germanaj (la rusa lingvo donis kvar aŭ kvin vortojn, la angla kaj pola iom pli): estas intereso fari la kalkulon, en kia nombra rilatiĝo trovas sin la vortoj romanaj je vortoj germanaj; mi emas pensi ke la kvanto de unuaj estas multpli granda ol la kvanto de la duaj, kvaroble aŭ ankoraŭ pli. Se ne malplaĉas al s-ro Grabowski, mi petas lin fari tiun ĉi kalkulon, sed nun mi atentigas lian provon solvi la duan parton de lia problemo, nome la demandon pri akcentoj.

La franca lingvo havas akcenton sur la lasta silabo de ĉia vorto. S-ro Grabowski en sia projekto forigas tiun ĉi regulon, kaj mi povus nenion diri kontraŭ tio ĉi, se li donus iun alian konstantan regulon, kiel oni devas akcentigi la vortojn. Tamen nur la verboj havas feliĉon esti defendataj kontraŭ trouzoj: la estanta tempo havas akcenton sur la antaŭ-lasto silabo, la tempo pasinta, estonta sur la lasta k. t. p. Sed la aliaj partoj de lingvo, substantivo, adjektivo k. t. p. estas ekster regulo. Bedaŭre mi ne povas doni sufiĉe da ekzemploj, ĉar la projekto de s-ro Grabowski estas nur sep-paĝa kaj enhavas nur tre malmulte da akcentigitaj ekzemploj. Jen estas kelkaj: fonetika, linio, rádico, ánĵelo, artikolo, acséntüo, spiritüo. Mi ne pensas ke iu, scianta la lingvon francan (ne latinan), sciis kie oni devas akcentigi tiajn vortojn (la vorto "fonetika" estas eĉ greka). Pro kio s-ro Grabowski evitas la francan aŭ la Esperantan akcentadon? Ja ne pro deziro akcentigi la vortojn tiel, kiel ili estas akcentigataj en iliaj propraj lingvoj? Ĉar tiam ni havus tro teruran "miksitaĵon", kiu povus timigi ne sole s-ron Grabowski. Sed ankaŭ sen tio, ĉu li ne sentas embarason, kion fari en vortoj kunmetitaj? La vorto "radico" estas laŭ s-ro G. elparolata "rádico"; la sufiksoj de la projektata lingvo permesas fari de "rádico" la verbon "radicifier" (aŭ "radicizer"). Kiel oni elparolos la verbon: *rádicifier* aŭ *radicifier*? Se en l'unua maniero, tiam mem s-ro Grabowski tumultiĝos, se en la dua, tiam oni devas fari ankoraŭ novajn regulojn por bridi iel tiujn ĉi promenemajn akcentojn.

Se la projekto de s-ro Grabowski estus projekto de ia nova sistemo, tiam ĝi meritus aŭ ne meritus longan esploradon. Oni tiam povus montri ke la malesto de akusativo faras grandan maloportunon, oni povus diri ke liaj sep paĝoj parolas nur pri kvino da prepozicioj, ke la estanta tempo de verboj havas finiĝon (ĕ), kiun havas ankaŭ la adverbo (e), kaj tio (ĉe buŝa parolado) estus kaŭzo de konfuzoj, precipe se la adverbo devenas el verbo, ekzemple la frazo: *ma frata turmente amĕ la kuzin'elo* (e kaj ĕ, t. e. e sen signo de mal-longeco kaj ĕ kun la signo estas ĉe parolado tute ne differenceblaj) povas egale signifi: "mia frato turmente amas sian kuzinon" aŭ "mia frato ame turmentas sian kuzinon": se la senco ankaŭ tie ĉi dependas de la loko de l'adverbo en la frazo, tiam la lokoordo de vortoj estas denove limigita (ĉar ĝin limigas jam la malesto de akusativa signo aŭ finiĝo). Se tiu ĉi projekto celus krei sistemon, oni povus fari multe da rimarkoj: sed ĝi ne estas sistemo, kaj laŭ la opinio de la projektanto eĉ ne povas esti tia, ĉar s-ro Grabowski mem konfesas, ke la Esperanto "estos ĉiam modelo por imito". Pro tio ĉi mi esploras nur la plibonigojn, kiujn li trovas bonaj por Esperanto. Ĉar tiuj ĉi



plibonigoj tuŝas ankaŭ la sufiksojn, ni rigardu, kiajn ŝanĝojn li deziras fari en tiu ĉi regiono.

Li diras “ĝiaj (de la Esperanto) *malnaturaj* prefiksoj kaj sufiksoj formas multe da barbarismoj anstataŭ vortoj internaciaj.” Sekve li estas malkontenta je tio ĉi. Pro kio la Esperantaj kunmetitaj vortoj estas *barbarismoj*, kaj kio signifas *naturaj* sufiksoj, li ne diras. Cetere estas tre malfacile motivi ĉian doniton sur sep-paĝa projekto, kaj la leganto estas igata diveni. Tio ĉi tamen estas danĝera, ĉar oni povas kompreni la aŭtoron tute ne tiel, kiel li dezirus. Por diveni, kion volas diri s-ro Grabowski per la vortoj “barbarismo” kaj “malnatura”, mi devas preni tiujn ĉi vortojn en ilia ordinare-uzata senco, kaj mi tion ĉi faras.

*Barbarismo* estas vorto, uzata en alia senco ol la mondo ordinare ĝin uzas, aŭ vorto maloportune konstruita. Sed la unua parto de tiu ĉi difino estas la necesa kondiĉo de ĉiu arta lingvo, se ĝi estas farita el unu nacia lingvo: ekzemple, mi trovas en la projekto de s-ro Grabowski la vortojn “tante” (en esperanto *tiam*, en franca lingvo *onkline*), “trie” (en esperanto ankaŭ *trie*, en franca lingvo *il trie* = li specigas, elektas) “sente” en esperanto *cente*, en franca lingvo -- *sentas*), k. t. p. Ĉu tio ĉi ne estas barbarismoj? Ĉar ĉia arta lingvo atentis nur la fonetikon de pruntataj vortoj, kreante alian skribmanieron ol la lingvo-patro, tiam ofte kaj neeviteble okazas, ke la vortoj de nova lingvo dank’ al la ŝanĝita skribmaniero povas esti prenataj en tute alia senco ol la vortoj havas en la lingvo-patro. Estas facile kompreneble ke “barbarismoj” estas malforigeblaj el ĉiu lingvo arta. Rilate al la dua parto de la difino (la malbona konstruo de vortoj), tion ĉi mi ne povas esplori, ĉar mankas al mi kriterio por juĝi: mi riskus kritiki ion, kion s-ro Grabowski eble tute ne volis diri. Ĉu la projektanto efektive opinias ke “sento” estas pli bone vortfarita ol “cento”, “poe à poe” (en la franca lingvo: *peu à peu*) pli rafina ol “iom post iom”, “letro” pli bone ol “letero” k. t. p.? Bedaŭre s-ro Grabowski ne kritikis, li nur diras: viaj vortoj estas malbonaj, anstataŭ ilin per tiuj ĉi.

Por fini tiun ĉi artikolon, ni preparolu la “naturajn” sufiksojn de la projektanto. Kion li nomas “natura” estas ankaŭ sekreto. Se li volas diri per tio ĉi, ke estas bezono doni al ĉia sufikso sencon, kiu estas ne kontraŭ ĝia senco en lingvo-patro, tiam mi diros, ke ne ekzistas lingvo, en kiu ĉia sufikso havas unu saman sencon. Tiel la vortoj: *boulangerie, librairie, imprimerie* signifas: bakejo, librovendejo, presejo, sed la vortoj *chevalerie, coïonnerie, confrerie, mocquerie* signifas: rango de kavaliro, timemeco aŭ maldelikateco, frateco, moko. La francaj sufiksoj *iel* kaj *al* havas ofte unu saman sencon kaj signifas “rilatanta al io aŭ iu:” *financiel, frontal*. Sekve por teni sin al “naturaj” sufiksoj de unu lingvo oni devus krei diversajn sufiksojn, kiuj havas unu signifon kaj doni al unu sufikso diversajn sencojn. Tio ĉi estas nenatura, kaj oni devas diri ke viva “natura” lingvo tute ne estas natura. Preni tiamaniere naturan lingvon por modelo certe ne povas voli s-ro Grabowski. Sed kion li ne volas, tion li faras. Unue li deturniĝas de la senco de francaj sufiksoj kaj kreas tiel “barbarismojn”, kaj due li prenas diversajn sufiksojn en unu sama senco.

La projektanto donas al la sufikso *abl* la sencon *inda*. Tiel “admirabla, memorabla, honorabla” (paĝ. 45) signifas, kiel ankaŭ en la lingvo franca: admirinda, memorinda, honorinda. Sed laŭ tio ĉi la vortoj: “canalizabla, frecantabla, ekzorabla, forjable” devus signifi “kanalizinda” k. t. p., sed la francaj



vortoj “canalisable, fréquentable, forgeable, exorable” signifas: kanaligebla, vizitebla, forĝebla, petebla k. t. p. Ho, kiaj barbarismoj!

La sufikso *oz* signifas en la projekto *riĉa je*, ekzemple: *doloroza, melodioza, calorosa*; sekve ni havas rajton vortfaradi: *horosa*\*) (feliĉa aŭ riĉa je horoj?), *serioza* (efektive serioza aŭ riĉa je serioj, ĉar la franca *serie* = serio en esperanto?).

La sufikso *eri* (loko por profesio) estas ankaŭ ne uzebla ĉar se bonaj estas la vortoj: librerio (france: *librairie*), imprimerio (*imprimerie*), kion ni faros kun la francaj vortoj *chatterie* (dolĉaĵoj, frandaĵoj, perfidemaj ĝentilaĵoj), *piperie* (trompo, fanfaroneco), *flanerie* (nenionfarado) k. t. p.?

La sufikso *ez* anstataŭas la Esperantan sufikson *in*. Ĉu pro tio la sufikso *ez* estas pli bona, ĉar ĝi estas prenita el la lingvo franca? Ĉu “aktorezo” estas pli komprebla ol “aktorino”, “rusezo”, ol “rusino”; ĉu oni faros la vorton “cuzezo” aŭ ĝian esperantan signifon “kuzino”? Kion oni faros kun la franca vorto *catacherèse* (trouzvorto) kaj kun multaj aliaj de tiu ĉi speco?

La sufikso *on* signifas “juna, malgranda” (eglon, grunono). Sed la franca sufikso *on* ne ĉiam havas tiun ĉi signifon; ekzemple: pigeon = kolombo (ne malgranda); malgranda, juna kolombo = pigeonneau; kuniklito = lapereau; kontraŭe, *pigne* = metala brilo, *pignon* = supra parto de muro, dentorado k. t. p.

La sufikso *oar* signifas “aparato, instrumento” (rezervoaro, presoaro), sed ekzistas ankaŭ francaj vortoj: trottoir, boudoir, ivoire, mouchoir (poŝotuko), pouvoir (potenco, povo), kiuj signifas nek aparatojn, nek instrumentojn.

La sufikso *ist* signifas, kiel ankaŭ en Esperanto, “specialisto” (*dentisto, oculisto*) kaj la sufikso *or* — okupadon (*actoro, vendoro, li:oro*). Tiuj ĉi ambaŭ sufiksoj estas maldiferenceblaj kaj unu estas superflua. Tio ĉi sama estas direbla pri la sufiksoj *ix* (konduki al) kaj *ifi* (fari); s-ro Grab. vortfaradas: fals-*ifi*-er, pur-*ifi*-er, glor-*ifi*-er, rus-*ifi*-er kaj organ-*iz*-er, natur-al-*ix*-er, leg-al-*iz*-er. Pro kio mi elektos: “rusifier”, sed ne “rusizer”? Kie estas la kriterio de vortfarado en tiu ĉi okazo?

Mi montris 10 sufiksojn, sed la projektanto donas ankoraŭ 13: *an* (kun signifo Esperanta), *et* (ankaŭ kun signifo E.), *al* (apartenanta al objekto aŭ persono; tiu ĉi sufikso estas sufiĉe bona, sed la Francoj ankaŭ ne uzas ĝin konstante: *national* = rilatanta al nacio, *financiel* = rilatanta al financoj), *atr* (malgrandigo de kolora denseco: tiu ĉi sufikso estas superflua, ĉar estas jam *et*, kiu malgrandigas econ, sekve *verdatra* tre bone = verdetaj), *es* (anstataŭas la Esperantan sufikson *ec*, kredeble pro tio ke la franca sufikso *esse* montras econ: *richesse, jeunesse*, sed econ montras ankoraŭ aliaj francaj sufiksoj: *froideur, fertilité, galanterie*. La aliaj sufiksoj: *aj* (manipulacio, io prenanta parton en: s-ro Grab. vortfaradas: lav-*ajo*, savon-*ajo*, blam-*ajo*. La unua senco de tiu ĉi sufikso ne estas taŭgebla, la dua estas Esperanta), *ad* (konsistanta en... ekz: palis-*ado*, limon-*ado*. Pro kio ne palis-*ajo*, limon-*ajo*? Ĉu ankaŭ promen-*ado* = la promenade?), *ement, ans* (ago, eco), *ier* (persono, objekto), *itat* (eco — jam la tria eco!), *sion, ur* — ili estas aŭ sence malklaraj, aŭ malfeliĉaj aŭ superflujaj.

Jen estas la tuta projekto, analizita ne en senco, kiel oni devas fari pli bonan sistemon, sed nur en ĝia temo enporti plibonigojn en la lingvon Esperanto. La leganto vidas ke la plibonigantaĵoj ne estas pli bonaj ol la

\*) La franca vorto estas *heureux*, sed s-ro Grabowski ĉie anstataŭas la dusilabon *eu* per *o*: *acteur* = aktoro, *réformateur* = reformatoro; la franca vorto *heure* estas anstataŭita per “horo” (paĝ. 40).

plibonigataĵoj. S-ro Grab. forĵetas lingvon-miksitaĵon kaj elektas *unu solan* lingvon, farante motivon ke ĝi enhavas "ĉiujn tiel nomatajn internaciajn vortojn", t. e. ĉar ĝi estas ankaŭ miksitajo: li ne volas barbarismojn, kiuj estas tamen necesaj al ĉia arta lingvo; li deziras havi pli naturajn akcentojn kaj kontraŭdiras al si mem dank' al neceso havi kunmetitajn vortojn; li volas pli bonajn sufiksojn kaj la donitaj de li estas aŭ pli malbonaj aŭ egalbonaj ol la Esperantaj (en senco ke liaj kaj la Esperantaj sufiksoj estas egale fremdaj al la spirito de la franca lingvo). Al fino li tute ne montras kiel oni povas egalpezi la "barbaran" prefikson *mal*, kiu ŝparas la kaplaboradon por ellerni centojn aŭ milojn da vortoj; li ne donas egalpezon por sufiksoj *ar*, *em*, *eg*, *dis*, *abl* (lia *abl* = *inda*), *ĉj*, *ad*, *ej*, *dis* k. t. p. k. t. p., kiuj prezentas ŝparon por miloj da vortoj. Anstataŭ tiuj ĉi *necesaj* li donas kelkajn *superfluajn*.

S-ro Grabowski ne povas disputi, dirante, ke ankaŭ Esperanto havas malfeliĉaĵojn, similajn al la neoportunaĵoj de lia projekto. Se li diros, ke kelkaj radikoj Esperantaj kontraŭiĝas al iaj vortoj (ekz.: la substantivo sukero = *suk* + *ero* k. t. p.), tiam mi respondos: via projekto nenion diras pri tio ĉi: anstataŭ fari tian projekton, faru bonan kritikon, kaj se viaj opinioj estos alprenindaj, tiam la mondo pli aŭ malpli frue, en tempo oportuna, nepre prenos ilin, se la mondo ĉiam preferos pli bonan je malpli malbona. Ĝis nun s-ro Grabowski multe laboris por la ideo de lingvo internacia. Sed nun ne estas malfacile vidi, ke lia lasta ago (la projekto) ne estas lia plej bona faro.

**A. Kofman.**



## Esperantistaj sentencoj.

Ne tiu estas bona esperantisto, kiu bone esperas, sed tiu, kiu ebligas bonan esperon.

Se vi skribas malbone en via propra lingvo, havu la bonecon skribi nur en ĝi, ĉar en Esperanto oni skribas sufiĉe malbone sen via helpo.

Nur talento, komprenado, imago, fantazio, klareco kaj bongusto — kaj vi ĉion tre bone kaj bele esprimos en Esperanto. Oni bezonas nenion pli...

Internacieco ne estas neigo de nacieco: internacieco ne pretendas forigi la malbonajn ecojn de la nacioj; ĝi volas nur transdoni la bonajn ecojn de unu nacio al la aliaj.

Kunigu la animetojn de la naciaj lingvoj -- vi havos la animon de l' lingvo internacia.

Krei lingvon, en kiu oni povas esprimi nenian malsaĝon, kaj devigi ĉiun kontraŭulon de lingvo internacia paroli en tiu ĉi lingvo — jen, ŝajne, estas la sola rimedo fari amikon de lingvo internacia el ĉiu ĝia malamiko. Se vi ne konsentas, serĉu alian rimedon...

Ŝ.



### Interparolo subaŭskultita:

"Ĉu Vi estas esperantisto?"

— Jes!

"Hm... Domaĝe..."

— Sed Vi ja ne estas esperantisto?

"Mi?!..."

— Jes, Vi.

"Neniam!..."

— Dankon al la Dio:

**Kage.**

## Gottfried Wilhelm Leibniz

### kaj lingvo tutmonda.

La plejmulto de niaj legantoj scias, ke Leibniz en la verko "*Dissertatio de arte combinatoria*" tuŝas la demandon pri lingvo tutmonda. Jen kion ni trovas pri tio ĉi en la glora verko "*Vorlesungen über Geschichte der Mathematik, dritter Band. Leipzig 1894/5*" de la eminenta matematikisto Moritz Cantor (ĉapitro 84, paĝoj 38—42):

"*La kombinaciaj konsideradoj* mahmultege estis novaj. Ĉe Tartaglia, ĉe Cardano, ĉe Buteo, plej detale ĉe Pascal en lia verko "*Traité du triangle arithmétique*" (vol. II, p. 480, 489, 517, 691), disvastigita en la jaro 1665 de la librokomercisto, Leibniz povus vidi, kiel multe oni antaŭigis je li. Sed unue tiuj ĉi fontoj estis nekonataj al li, almenaŭ en tia grado, en kia ilia enhavo ne transiris en la verkon de Schawenter "*Erquickstunden*"\* (problemoj 32 kaj 33 de la I-a libro de tiu ĉi verko, tiam tre disvastigita en Germanujo), due la punkto de eliro kaj ankoraŭ pli multe la punkto de la lasta celo estis ĉe Leibniz de tute alia naturo, ol ĉe liaj antaŭuloj. Ĉe la lastaj oni estis okupita per malgrandaj matematikaj ŝercoj (se oni povas uzi tiun ĉi esprimon), kiuj ĉe Cardano donas la eblon ekkoni la alundo pri la elkalkulado de eblecoj (Calcul de la probabilité, Wahrscheinlichkeitsrechnung) kaj nur ĉe Pascal sin levas al pli alta signifo matematika. Leibniz estis laŭ la epoko kaj, eble, laŭ la direkto de sia prudento antaŭ ĉio filozofa kaj poste matematikisto. Jam de la jaro 1663 en la kapo de Leibniz estis la ĝermo de "*Scientia generalis*", scienco generala\*\*, kiu devas enhavi ĉiujn apartajn sciencojn kiel subsekciojn aŭ kiel uzablajojn. En la potenco de la generala scienco devas ankaŭ esti komuna lingvo, *lingua rationalis*, kiu devas tiel proksime sin kunjungi kun la ideoj, ke ĝi povu servi kiel "*filum meditandi*", gvidfadeno por la proceso de l' pensado, eĉ ke la skribado, sen kiu la lingvo povus servi por interkomunikadoj nur en plej malvastaj rondoj, posedu tian saman econ de helpanto por la ideoj. Ankaŭ en tiu ĉi direkto Leibniz estis ne sen antaŭuloj. Li ne estis la unua, kiu havis almenaŭ en vido la eblecon de pazigrafio (mondskribado), per kiu, en ĉia okazo, ne estus ankoraŭ donita la mondlingvo. La ĥina skribado efektive estas legata de diversaj popoloj, de ĉiu en sia lingvo, kaj ebligas inter ili la reciprokan komunikiĝon, dum ili buŝe ne komprenas unu la alian. Kaj ankaŭ en Eŭropo de la jaro 1661 provoj estis transdonitaj al la publiko\*\*\*).

"*John Wilkins (1614—1672)*, unu el la fondantoj de la Royal Society en Londono, predikisto kaj de la jaro 1668 episkopo de Chester, eldonis en la jaro 1641 verkon, kiu havis la titolon: *Mercury, or the secret and swift Messenger: shewing how a Man may with Privacy and Speed communicate his Thoughts to a Friend at a Distance*, kaj en ĝi li provas ordigi la komprenajojn (note, Begriff) kaj sistematigi ilin, por ke per certaj simboloj, kiuj

\*) Amuzaj horoj.

\*\*\*) Die philosophischen Schriften von Gottfried Wilhelm Leibniz, herausgegeben von C. J. Gerhardt, VII, 17 lin. 3 v. u.: *Rem enim iam a decimo octavo aetatis anno agitari et quotidianis experimentis in instituto sum confirmatus, tametsi rudia satis prima cogitata essent.*

\*\*\*) Id. VII, 6—9.

ankaŭ apartenas al certa sistemo, oni povu fari okulvidaj ĉiujn eblajn komprenaĵojn. Alia anglo, *George Dalgarno*, daŭrigis la plenumadon de la ideo kaj donis al ĝi praktikan formon en la jaro 1661 en sia *Ars signorum, vulgo character universalis et lingua philosophica*. Li formas 17 fundamentajn komprenaĵojn, kiujn li proponas prezentadi per simplaj literoj de la latina kaj greka alfabeto (de la lasta nur  $\eta$  kaj  $\nu$ ) kaj li kredas, ke tio ĉi estas sufiĉa. Post li Wilkins denove turnis sin al la jam antaŭe prilaborita objekto kaj en la jaro 1668 publikigis la *Essay towards a Real Character and a Philosophical Language, with a alphabetical Dictionary*. De ankoraŭ pli malfrua dato devis esti la provo de *P. Labbe*, pri kiu Leibniz en 1709 rakontas\*), ke per kelkaj ŝanĝoj li volis fari komunan lingvon el la latina.

“Sekve kiam en 1663 Leibniz je la unua fojo faris planon eltrovi *Scientia generalis*, ekzistis jam la unua verko de Wilkins kaj la verko de Dalgarno, sed ĉu jam iu sur la kontinento de Eŭropo tiam ilin vidis, estas almenaŭ dubinda. Pri la juna germana kandidato oni tute povas afirmi kun kredebleco, limanta kun certeco, ke li havis neinan okazon por ekkoni tiujn verkojn eĉ nur laŭ la nomoj.

“Poste do estis alie. Leibniz posedadis la verkon de Dalgarno kaj provizis ĝin de randnotoj, kiel li tion ĉi faris kun la plejmulto da libroj, kiujn oni trovis inter liaj restitaĵoj\*\*). Li kunigas en siaj notoj laŭdojn kaj mallaŭdojn. Li opinias, ke la metodo de Dalgarno, kaj ankaŭ tio, kion faris el ĝi Wilkins, liveras facilan komunikadon inter homoj de diversaj lingvoj, sed la metodo ne estas ankoraŭ pro tio *Characteristica Realis*, kiel li intencis ĝin *Vari*. Ĉe la eltrovo, ĉe la konservado en memoro, ĉe la juĝado ĝi devas disvolvi nevenkeblan forton. Ĉe kia ajn pensmaterialo ĝi devas fari tian servon, kian faras la aritmetikaj kaj algebraj simboloj.

“Bedaŭrinde Leibniz neniam kaj nenie prezentis, kiamaniere liaj grandaj celadoj povas efektiviĝi. Li faris objekton de siaj laboroj la dividadon de komprenaĵoj unuflanke kaj la unuigadon de komprenaĵoj de la dua flanko. Li ekkonis la gravecon de la atingado de pleneco en la formado de kunigaĵoj. Li ankaŭ uzadis la matematikajn simbolojn en malmulte ŝanĝita formo, — kiel ekzemple enrondigita plus-simbolo, — por la logikaj operacioj, kies parenceco kun la operacioj de la aritmetiko estis por li klarvidata. Sed neniam li donis klaran prezentadon pri tio, kion li komprenas sub la nomo *Characteristica Realis*.

“Ni parolis (antaŭe) pri la *Characteristica geometrica*. Nun ni ekkonas, ke tiu artikolo de la jaro 1679 devis plenumi parton de tiuj celadoj, kiuj estis difinitaj fariĝi propra objekto de la *Characteristica Realis*, kaj ke la nomita verko ekaperis dum la pensado pri la pli komuna problemo. Por la legantaro de nia verko ni permesas al ni jam tie ĉi antaŭmemorigi pri la objektoj, kiuj efektive estas preparolotaj nur en la ĉapitro 89, kaj fari la rimarkon, ke la partigado de komprenaĵoj en elementajn partojn devis konduki al la diferenciale (kursivo de la tradukinto).

“Ankaŭ tiel same malmulte Leibniz forlasis egalajn celadojn en siaj pure filozofaj esploradoj. Ne esplorante ilin, ni permesas al ni meti en memoron la nomon de *monado*, kiu aperas ĉe Leibniz je la unua fojo en la jaro 1698\*\*\*).

\*) Id. VII, 36 lin. 12 v. u.

\*\*) Id. VII, 7.

\*\*\*) Id. IV, 511 lin. 20.



“En la artikolo de 1666, kies priparoladon ni nun fine atingas, Leibniz alpaŝis al tiu parto de sia granda plano, kiu konsistas en la atingado de la plena nombro da eblaj kunigoj de komprenajoj kaj al la matematika prezentado de tiu ĉi problemo, al kiu li donas la nomon *Ars combinatoria*, kiu ankaŭ restis por ĝi. Li konsideras la permutaciojn kaj ankaŭ la kombinaĵojn\*). La nombro de la konsiderataj elementoj nomas sin *numerus*, la permutaciojn oni nomas *variationes*, la kombinaĵojn — *complexiones*, kaj *exponens* estas la klaso, en kiu oni kombinas\*\*). La exponens estas ankaŭ uzata por formado de vortoj, kies partoj estas la nomoj de l' klaso, — vortoj, kiuj portas malnovan stampon. *Combinatio* por ligado po du oni renkontas ĉe multaj romaj verkistoj, *conternatio* por ligado po tri — ĉe *Hyginus*. Nova estas ĉe Leibniz nur la maniero de skribado responde la presado en la formo de *com2atio* kaj *con3natio*..... (Sekvas la parto matematika de la *Ars combinatoria*, kiun ni ellasas, ĉar ĝi estas tro speciala por la legantoj de nia gazeto).

“Tio ĉi estas eble ĉiuj matematikaj rimarkindaĵoj de la artikolo. Apartaj ekzemploj estas karakteraj por la filozofa celado de la aŭtoro, kaj oni trovas ankaŭ memorigon pri la *Logica inventiva* kaj *Scriptura universalis*”.

S. Ŝ.



## Epigramoj.

### 1. El Lessing.

Ci-tie kuŝas Petro Brun.  
Gajninta per mortigo sia,  
Ĉar li ja post la morto nun  
Fariĝis polvo el nenio.

A. Kofman.

### 2. El Haug.


Ĉie volas brilli nia Marcelino  
Kiel poetino, kiel belulino.  
Sed nur la vizaĝo al ŝi apartenas.  
Ĉar la pensojn ŝi el fremdaj libroj prenas.

A. Kofman.

### 3. El Lucilius.

Oni habilas, ke vi viajn harojn nigrigas... Malvero!  
Ili jam estis plennigraj, kiam vi ilin aĉetis.

A. Kofman.



## Problemo.

Du personoj *A* kaj *B*, kiuj elspezis egalajn kapitalojn por iliaj komercaj komunaj entreprenoj, vendis bovaron kaj ricevis por ĉiu bovo tiom da rubloj, kiom da bovoj estis en la aro. La enspezitan sumon ili elspezis por aĉeti aron da ŝafoj, pagante po 10 rublojn, kaj unu ŝafidon. Ĉe la disdividado *A* ricevis unu ŝafon pli, ol *B*, kaj pro tio li fordonis al *B* la ŝafidon kune kun malgranda kontanta sumo. Kiom da rubloj *B* ricevis kontante?

\* \* \*

Ni petas ĉiujn, kiuj solvos la problemon, sendi la solvojn al la aŭtoro de l' problemo, s-ro *S. Satunovskij* (Rusujo, Odeso, Hersonskaja, N:o 25). Kiu solvos plej bone la problemon kaj skribos sian solvon en la plej bona senerara esperanta stilo, *tiu ricevos de la redakcio unu ekzempleron de "Lingvo Internacia" por 1896.*

\*) Id. V, 14.

\*\*) t. e. *exponens* estas la nombro da elementoj de unu grupo, kaj la *numerus* — la nombro da ĉiuj elementoj, el kiuj oni faras grupojn. *La tradukinto.*



## Adresaro de niaj abonantoj.

### Svedujo.

1. S. Agrell, Örebro.
2. P. F. Dandernell, Köping.
3. L. J. Fredberg, Mellerud.
4. C. G. Planting-Gyllenbåga, Majoro. Tranås.
5. Anders Eriksson, Bonäset, Ström.
6. Fr-ino Anna Hultén, Kalmar.
7. Ellert Johnson, Tösta, Hölö.
8. Fr-ino Alma v. Gedda, Fiskeboda, Äs.
9. K. O. Svanbom, pastro, Öregrund.
10. S-ino Hanna Theorell, Upplandsgatan 25, Stockholm.
11. O. Olsson, Östersund.
12. Otto Zeidlitz, pastro, Korpilombolo.
13. B. G. Siösteen, Kristianstadsbladet. Kristianstad.
14. Hj. Ljungner, stud. medic., V. Storgatan 16, Kristianstad.
15. A. Adelsköld, Majoro, Villagatan 2. Stockholm.
16. Fr-ino Malin Mattsson, 2:dra Långgatan 4 B, Göteborg.
- 17—19. P. Ahlberg, policisto, Döbelnsgatan 50, Stockholm.
20. Fr-ino Lydia Tidestrand, Arboga.
21. Valdemar Langlet, Uppsala.
22. E. E. Etzel, Uppsala.
23. Karl Holm, Uppsala.
24. Karl Wijkström, Uppsala.
25. Paul Nylén, Uppsala.
26. Ossian Holmqvist, Uppsala.
27. C. W. Sydow, Värjö.
28. S-ino Elisabeth Kallstenius, Kaliforniegat. 1. Helsingborg.
29. Emil Rosell, pastro, Hölö, [Johnson].
30. C. R. Grandin, paroĥestro, Hölö, [Johnson].
31. J. A. Zinoviev, ministro de Rusujo, Stockholm, [A. Zinoviev].
32. Fraŭlino Maja Fornander, Örbyhus, [J. Wasniewski].
33. Mauritz Sterner, Svartbäcksgat. 11, Uppsala, [K. Wijkström].
34. Hugo Holmberger, Kungsgatan 45, Uppsala, [Wijkström].
35. P. G. W. Isberg, membro de l' plej alta juĝistaro, Floragat. 16, Stockholm, [Adelsköld].
36. P. Olsson, Kungsgat. 22, Uppsala.
37. Gunnar v. Heideken, Vaksalagatan 12, Uppsala, [Wijkström].
38. James Kock, Ö. Ågatan 51, Uppsala, [Wijkström].
39. Ernst Halling, Storgatan 66, Kalmar.

### Ameriko.

40. Smithsonian Institution, Washington D. C., U. S. A.
41. E. D. French, 204 West, 46 th. St., New-York, U. S. A.
42. Eugene Schieffelin, 7 West, 36 th. St., New-York, U. S. A.
43. R. Geoghegan, Tacoma, Wash., U. S. A.
44. Edw. L. Stechel, Doylestown, Penn. U. S. A.

### Bohemujo.

45. Joseph Forkarth, Josefstadt.
46. Friedrich Brich, Superleŭtenanto, Josefstadt.

### Bulgarujo.

47. Hr. Popov, Gorna-Orchovica, Koza-revo.

### Finnujo.

48. Gösta Englund, Uleåborg.
49. R. Nordenstreng, Lilla Robertsgatan 5, Helsingfors.
50. M. Nordensvan, telegrafestro, Kuopio.
51. Waldemar Lindblad, Borgå.

### Francujo.

- 52—151. L. de Beaufront, Epernay. (Marne).
152. René Lemaire, Place Lasson, Epernay, (Marne).
153. E. Lombard, 77 rue Denfert-Rochereau, Paris.
154. E. Arduin, 11 rue Turenne, Bordeaux.
155. S-ino Axelia Waern, Les Abeilles, Arcachon.

### Germanujo.

- 156—160. W. H. Trompeter, Schalke, Westfalen.
161. G. v. Willebrandt, Oberstrasse 147, Crefeld.
162. D-ro M. Reinhold, Apostel Paulus' Str. 3, Schöneberg, Berlin.
163. Robert Exner, Kochstrasse 22, Berlin S. W.
164. L. A. Klepzig, Leipzig-Gohlis.
165. Max Wahren, Friesenstrasse 39, Hannover.
- 166—190. G. Dumpert por la Klubo Esperanto, Rollnerstrasse, 55, Nürnberg.
191. Eugen Heintzeler, superinstruisto, Wilhelmsstrasse 10, I. Stuttgart.

## Italujo.

192. D-ro **Daniele Marignoni**, *Crema*.

## Portugalujo.

193—202. D-ro **Costa e Almeida**, *Rezende*.  
(nome por) D-ro **J. J. da Cruz Capello**,  
*Rezende*.

D-ro **Alvaro d'Azeredo**, *Rezende*.

D-ro **Albano Leite Ribeiro de Magalhães**, *Rezende*.

D-ro **José Joaquim Pinto**, *Rezende*.

**Luciano Vicente Coelho**, Rua da Constituição 481, *Porto*.

**Alfredo Ferreira de Faria**, Rua da Constituição 265, *Porto*.

**Adriano Abilio de Sá**, Inĝeniero. Inspektoro de l'fervojo de *Mormugão* (India Portugueza).

**José Vieira Padilha**, Caminho de ferro do Douro. Palla. *S.ta Leocadia*.

**Francisco Pinto Pereira**, Rua nova de S. José, *Regua*.

203. **João Mouza**, Rua de S. Bento 225, *Lisboa*.

204. **Luiz Antonio Galvão Moraes Sarmiento**, professor oficial, *Aldegallega*

## Rusujo.

### I. Norda:

205. **I. J. Ŝetalov**, Ul. Glinki, n:o 1. Obŝestvo Straŝiovanja Ĵizni. *S. Peterburg*.

206. **A. Burenkov**, Vasiljevski Ostrov, 13 Linia, dom 34, loĝ. 9. *S. Peterburg*.

207. Prof. **D. Bobylev**, universitato, *S. Peterburg* (V. Ŝmurlo).

208. S-rino **Helena Pokrovskaja**, Fontanka n:o 6, *S. Peterburg* (V. Ŝmurlo).

209. **Oscar Serck**, *S. Peterburg*.

210. **N. Borovko**, Malaja Dvorjanskaja 11, loĝ. 6. Peterb. Storona. *S. Peterburg*.

211. **A. Borovko**. Malaja Dvorjanskaja 11, Peterb. Storona. *S. Peterburg*.

212. **Geispic**. Komitet Inostranoj cenzuri, *S. Peterburg*.

213. Redakcio de la gazeto "Njedela" Ivanovskaja, 4. *Peterburg*.

214. **W. Waŝer**, instruisto. Oficerskaja 54, *Peterburg* [Espero].

215. **F. de Kanaloŝŝy-Lefler** Soljanoj pereul. n:o 6, *Peterburg* [Espero].

216. S-ino **A. M. Grineva**, *Peterburg* [Espero].

217. **K. I. Ostaneviĉ**, Glavnaja Telegrafnaja Kontora, *Peterburg*.

218. **V. G. Korolenko**. Redakcio de la ĵurnalo "Ruskoje Bogatstvo". Bassejnaja 10, *Peterburg*.

219. **Helena Mazen**, Platformo *Kersel* (Baltiŝkaja Ĵeleznaja Doroga [Waŝer]).

220. **Ŝtalberg**, Bolŝaja Ĵurjevskaja. 309. *Revel* [W. Waŝer].

221. **E. de Wahl**, Arefjevskaja. d. Sassi *Revel* (Estland).

### II. Intera:

222—224. **A. Grabovski**, Fabriko de s-ro Poluŝin. *Inranovo-Voznesensk* (gub. de Vladimir).

225. **V. T. Solodiŝin**, Ivanovskaja 202. *Vladimir*.

226. **I. Sirajev**, Roĵdestvenskaja ul., domo de Izmajlova. kv. Rozova, *Jaroslavl*.

227. **Seleznet**, Dorogomilovskaja, d. Samarina, log. 7. *Moskvo*.

228. **Redakcio de Posrednik**, Dolgij pereulok, Zubovo. *Moskvo*.

229. **N. Rozanov**, Ŝeremetjevskaja Bolnica, loĝ. protojereja Rozanova, *Moskvo* [V. Laskin].

230. **M. I. Fedorovski**, Ĉistije prudi, Milnikov pereulok, d. de Korovin, loĝ. 21, *Moskvo*.

231. **A. I. Laskin**, Bogorodski ujezd, Iljinskoje Poŝtovoje Otdelenije, selo Ĥateiĉi (gub. de Moskvo) [V. Laskin].

232—239. **V. J. Laskin**, Progimnazio, *Roslavl* (gub. de Smolensk).

240. S-ino **Maria Sereda**, *Suraĵ* (gub. de Ĉernigov).

241. **D. G. Burnevski**, psalomŝĉik, St. *Tuliĝolor* (gub. de Ĉernigov).

242. **A. T. Kokorev**, *Dmitroevsk*, (gub. de Orel).

243. **V. N. Vojejkov**, *Sudĵa*, vilaĝo *Guevo*. (gub. de Kursk).

244. **Kramarenko**, *Miropolje*, Sudĵanski ujezd (gub. de Kursk).

245. D-ro **V. Milidejev**, *Temnikor* (gub. de Tambov).

246. **Aleks. Sjemjonov**, Stancia Zemetĉino, Morŝanskaho u. Selo *Golodorka* (gub. Tambov).

247. Inĝeniero **Julij S. Leŝĉinski**, Voznesenskaja gora, domo 21, *Voroneĵ*.

248. **Ivan Tregubov**, *Rossoŝa* (gub. de Voroneĵ).

249. **V. L. Kravcov**, *Boguĉar*, (gub. de Voroneĵ).

250. S-ino **O. A. Stepanova**, *Boguĉar*, selo *Lebedinka* (gub. de Voroneĵ) [V. Kravcov].

### III. Okcidenta:

251. **M. F. Zamenhof**, Karmelitskaja n:o 15, *Varsovio*.

252. S-rino **A. V. Proĥoroviĉ**, Ĵuravja n:o 15, *Varsovio*.

253—254. **J. Wasniewski**. Ĥmĵelna 68. *Varsovio*.

255. **Albin Jurewicz**. Str. Marŝarkovskaja, 138. *Varsocio* [Wasniewski].

256. **Kazimierz Glin'ski**, Str. Novogrodska, 29. *Varsovio* [Wasn.]
257. **F. Ender**, *Czepor* P. Uniejów (gub. de Kalisz, Polen).
258. **St. Dmochovski**, *Janor Lublinskij* (Polen).
259. **I. H. Bogovski**, stolonačalnik Lublinskoj Kazennoj Palati. Ogorodovaja, 6. *Lublin*.
260. **S. Silbernik**, *Korno*.
261. **A. Dombrovski**, Pastro. *Korno*.
262. **N. M. Solovjev**, Kontrolnoje Upravljenje, *Korno* [Zinovjev].
263. **M. S. Rakitski**, Suraj, selo *Ostrorokije* (gub. de Vitebsk).
264. **I. M. Lojko**, Admin. de fervejoj de Polessje, *Vilna* (gub. de Vilna).
- 265—266 D-ro **L. M. Zamenhof**, *Grodno*.
267. **A. Rubinzon**, rabeno, *M. Rotnica*, tra *Druskeniki* (gub. de Grodno).
268. **M. Jezerski**, *Volkovisk* (gub. de Grodno).
269. **Moses Goldberg**, *Narocl* (gub. de Minsk).
270. S-rino **Vanda Šalevič**, Mestečko Gorodyšć. imenie Dorogovo (gub. de Minsk).
271. S-rino **K. A. Nadeždina**, *M. Pariči* (gub. de Minsk).
272. Leütenanto **Škorbatov**, *Starokonstantinor*, (gub. Volinskaja).
273. Leütenanto **Rosseter**, *Starokonstantinor*.
- 274—276. S-rino **E. Mankovskaja**, Virina lernejo, *Kremenec*. (gub. Volinskaja).
177. S-rino **L. G. Malinovskaja**, Virina lernejo, *Kremenec* (gub. Volinskaja). [E. Mankovskaja].
278. **S. I. Borkovski**, pomošćnik smotritelja mujskoho učilišća, *Kremenec* [E. Mankovskaja].
279. **M. I. Jassievič**, Virina lernejo, *Kremenec* [E. Mankovskaja].
- IV. Suda:**
280. **V. Gernet**, Remeslennaja 11, *Odessa*.
281. **M. M. Abezguz**, Knjažeskaja 4, *Odessa*.
282. **S. O. Satunovski**, Hersonskaja 25, *Odessa*.
283. **A. S. Kofman**, Nežinskaja 34, *Odessa*.
284. **A. M. Arnold**, Staroportofrankovskaja 27,14. *Odessa*.
285. D-ro **I. M. Lucenko**, Jamskaja, domo de Theodorčik, 64—66, *Odessa*.
286. D-ro **I. G. Čorba**, Kontora Dobrovolnaho flota, vaporšipo "Saratov". *Odessa*.
287. **A. I. Andreev**, Deribasovskaja, domo de Julien, *Odessa*.
288. **L. A. Davidovič**, Tiraspolskaja, 6. *Odessa*.
289. **O. J. Pergament**, Hersonskaja, 28. *Odessa*.
290. **S. V. Jitkov**, Agentsvo Russkaho, Obščestva Parohodstva i Torgovli v. Prakt. Havani, *Odessa*.
291. **S. V. Christiani**, Dom predvoditelja dvorjanstva, *Kišinev* (Bessarabia) [V. Šmurlo].
292. **G. O. Šatunovski**, *Kamenec-Podolsk*.
293. **P. F. Pogorilko**, Mujskoje Duhovnoje Učilišće. *Kamenec-Podolsk* (gub. Podolskaja).
294. **A. V. Kolb-Selecki**, Kontora Špikovskaho Imenija, *Rahni-Lesovije* (gub. Podolskaja).
295. **J. E. Moskovčenko**, Kontora Špikovskaho Imenija, *Rahni-Lesovije* (gub. Podolskaja).
296. S-rino **E. J. Samarskaja**, Pošta stacio *Medžiboj* selo *Goloskovo* (gub. Podolskaja).
- 297—298. **N. I. Kušnir**, *Teplik*, (gub. Podolskaja).
- 299—301. **I. Kaminski**, *Teplik*.
302. **A. Sokanovski**, *M. Dašev*, (gub. de Kiev).
303. **Josef Milevskij**, Univers. spusk, dom 10, loğ 66, *Kiev*.
304. **A. Grünfeld**, stud. medic. Novo-Jelisavetinskaja, 9. *Kiev*.
305. **Karl Antonovič Trypolski**, *Berdičev*, Červonnoje, Branda fabriko (gub. Kiev).
- 306—308. **A. A. Zinovjev**, Sadovaja, propra domo, *Poltava*.
309. **E. V. Svjatlovski**, Zemskaja Bolnica, *Poltava* [Zinovjev].
310. **L. A. Ionin**, Zemskaja Bolnica, *Poltava* [Zinovjev].
311. **S. A. Volkenštejn**, Kuzneckaja, d. Smirnova, *Poltava* [Zinovjev].
312. **A. A. Pesockij**, Artiljerijskij Sklad, *Kremenčug*, (gubernio de Poltava).
313. Gorodskaja Biblioteka, *Kremenčug*.
314. Bibliot. Artiljerijskaho Sklada, *Kremenčug*.
315. **A. A. Frejdenberg**, rabeno, *Kremenčug* [A. Pesockij].
316. **V. P. Galperin**, Ugol Petropavlovskoj i Tupoj Birjukovoj, d. Solovejčika *Kremenčug* [A. Pesockij].
317. **M. M. Dettling**, Venskaja Kofejnaja, *Kremenčug* [A. Pesockij].
318. **S. A. Denesjevski**, instruisto de la gimnazio *Romni* (gub. de Poltava).
319. **I. Šubov**, Elektro-mekaničeskoje zavedenije, *Kerson*.
320. **I. Feldšar**, Ribnaja, 23. *Nikolajev* (gub. de Kerson).
321. **Radzievski**, veterinarrij vrač, *Novogeorgievsk* (gub. de Kerson).
322. **I. B. Fejnerman**, *Voznesensk* (gub. de Kerson) [Zinovjev].
323. **K. K. Hybert**, *Aleksandrovska* (gub. de Jekaterinoslav).

324. **H. J. Vins**, Selo *Polavica*, Josifovskoj Volosti, *Novomoskorsk* (gub. de Jekaterinoslav).
325. Fr-ino **Amalia Nömm**, Daĉa Koĉubeja, *Jalta* (Krim).
326. Fr-ino **Anastazia V. Davidenko**, *Jalta* [A. Nömm].
- V. Sud-orienta:**
327. I. **Portnov**, *Kamyšin* (gub. de Saratov).
328. **N. I. Spiridonov**, Gubernskaja Zemskaja Uprava, *Saratov*.
329. Inĝeniero **N. Kazi-Girej**, Stacidomo, *Borisoglebsk* (Sud-orient. fervojoj).
330. Princo **Pavel Andrejeviĉ Maksutov**, *Borisoglebsk*. [Kazi-Girej].
331. Inĝeniero **Sergej V. Strutinskij**, *Borisoglebsk*. [Kazi-Girej].
332. D-ro **Vjaĉeslav N. Tusnov**, Stacidomo, *Tokarevka* (Sud-orient. ferv.).
333. **A. A. Kazmin**, Stacio *Filonovskaja*, tra stacio *Filonovo* (Sud-Orient ferv.) [Kazi-Girej].
334. **A. Kapustjanski**, Kontora Glavnaĝo Inĝeniera Vladikavkazskoj, Jel. Doroĝi, *Rostov a. Don*.
335. **A. B. Fränkel**, Malij prospekt nro 47, *Rostov a. Don*.
336. **A. A. Vorobjev**, Glavnija masterskija Vladikaŭk. jel. dorogi *Rostov a. Don*.
337. **F. D. Avilov**, instruisto, I-a gimnasio, *Tiŝtis*.
338. **I. Z. Odiŝelidze**. Ŝtab. 2-j Kavkazskoj Kazaĉeĝ Divizii, *Erican*. [N. Kazi-Girej].
339. **G. I. Ĉulanovski**, Ispravlajuŝĉij dolĝ-

(Daŭrigo venos).

nost sudebnaĝo sledovatel. Selo *Petrovskaje* (gub. de Stavropol).

**VI. Orienta:**

340. I. I. **Kurajtis**, Okruĝnoj Artillerijskij Sklad. *Kazan* [Pesockij].
341. **A. Naumov**, Ĉerteĝnik. *Votkinsk* (gub. de Vjatka).
342. I. **S. Šamin**, domo de F. Postnikov. *Elabuga* (gub. de Vjatka).
343. **M. Neustrojev**, *Nitca* (gub. de Perm).
344. Inĝeniero **V. Šmurlo**, *Ĉelabinsk* (Siberia fervojo).
345. **Biblioteko de Pokrovskij**. *Ĉelabinsk*. [Šmurlo].
346. **I. Zotov**, Mariinskoje Zemledelĉeskoje Uĉiliŝĉe, st. *Mariinskaja* (Rjazana-Urala-fervojo).
347. Fr-ino **E. Jungmeister**, Virina gimnazio, *Ĉelabinsk*. [Šmurlo].

**VII. Siberujo:**

348. **P. Kadik**. Muĝskaja gimnazio, *Krasnojarsk* (Siberia fervojo).
349. **V. A. Dorzet**. Sobstvennij dom, *Krasnojarsk*. [Kadik].
350. **O. V. Dorzet**. *Strjetensk* (Priamursk prov.) [Kadik].
351. **E. F. Strĵalkovski**, *Nerĉinskij zavod* (prov. transbajkala).
352. **Pavel Mihajloviĉ Koĉergov**, *Kurgan vokzal* (gub. Tobolsk).
353. Biblioteko en *Kurgan*, Sib. fervojo. [V. Šmurlo].

**Aldono:**

354. I. **Lojko**, (vidu nro 264).
- 355—368. Nekonataj poŝtabonantoj.

## ANONCOJ.

**M**i deziras korespondadi en Esperanto kun amikoj de nia lingvo.

**V. Fedorovskij, Moskvo, Rusujo**, Chistije prudi, Milnikov pereulok, d. Korovina, loĝ. N:o 21.

**Depot' da semoj.**

**M. I. Fedorovski**

(Rusujo, Moskvo, Sadovaja, Krasnija vorota, domo Rauzer)

**vendas**

ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 30 kopek en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — *senpage*. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj ankaŭ en la lingvo Esperanto.

**Sinjoro E. Arduin**

komercisto en **Bordeaux**, *11 rue Turenne*, **Francujo**, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de liaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de liaj produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

**Ŝanĝo de adreso.**

**B. G. Jonsson** (antaŭa adreso Östersund, Svedujo) ŝanĝis nomon kaj adreson al

**B. G. Siösteen**,  
Kristianstadsbladet,  
Kristianstad.



## La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Remeslennaja 11, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Intencante dum la venonta somero fari vojaĝon tra Rusujo kaj aliaj landoj mi petas ĉiujn esperantistojn, kiuj deziras konatiĝi kun mi, ke ili sendu al mi siajn nomojn kaj adresojn. La lokoj, kiujn mi vizitos: Åbo, Helsingfors, Peterburg, Moskva, Nijnij, Borisoglebsk, Varsovio, Buda-Pest, Wien, kelkaj urboj en norda Italujo, kaj returnante, en Germanujo kaj eble en Francujo. Mi komencas mian vojaĝon la 15:a de Majo. *Valdemar Langlet*, Uppsala (Svedujo).

Sinjoro, tute ne havanta ecojn de agrabla kunparolanto, ne interesa kaj maljuna, deziras fari en venonta somero velocipedan vojaĝon tra Finnujo kaj Norvegujo, uzante por tio ĉirkaŭ du semajnojn. Decidi tiun vojaĝon li povas nur en okazo, se iu el lokaj turistoj-esperantistoj volos etendi al li la manon de helpo, konsentante servi al li kiel kompaniano kaj kondukanto.

Estus dezirinde ligi la diritan ekskurson kun la afero de propagando Esperanta.

Bonaj animoj (necese esperantistaj), konsentaj akcepti la proponon, volu skribi\*) pri ĉiaj kondiĉoj kaj detaloj laŭ la adreso: *Russie, Poltava, A. A. Zinoviev*. Propra domo.

\*) Esperante, france, angle, germane, itale, ruse, aŭ pole.

## Amikoj esperantistoj!

Por atingi la gravan celon de vastigado de nia lingvo en mia urbo, mi invitas ĉiujn lokajn esperantistojn kunigi sian energian laboron por dissendado kaj disdonado de la necesaj verkoj por Esperanta propagando.

Mi ankaŭ fervore petas ali-urbajn esperantistojn honori min per siaj korespondoj kaj konsiloj laŭ la sperto de esperanta propagando en iliaj urboj. Je tiela helpo mi sincere dankus.

**A. B. Fränckel,**

Tenejo de apoteka kaj parfumera vitraĵo

Malij prospekt N:o 47

Rostov, a. Don (Rusujo).

## Al niaj abonantoj.

En sekvo de kaŭzoj, kiujn ni ne konas, la lasta numero de nia gazeto tre malfrue alvenis al kelkaj el niaj abonantoj. Se iu koleras pro tio, ni petas lin, ke li pensu je la amaso da malfacilaĵoj, kiuj trafas entreprenon de tia speco, kiel la nia. Nia peno ĉiam estis kaj estos fari la plej bonan kion ni povas, rilate la gazeton. Niaj abonantoj volu rimarki, ke ni en la lasta nro donis ilustraciojn kaj ke ni faris tiun ĉi n:on 24:a-paĝan, kvankam ni nenion tielan promesis.

Ni ripetas nian peton al la personoj, kiuj eble ne ricevis ian n:on, ke ili tuj komuniku tion ĉi al ni.

Ni petas niajn verajn amikojn propagandadi nian gazeton. Ĉiu, kiu abonas 4 ek:emplerojn, ricevas

*la kvinan senpage.*